



Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belga

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

Sekve al la malvaloriĝo de la belga valuto, la prezo de ĉiuj libroj eldonitaj eksterlande, treege plialtiĝis.

Pro tiu kaŭzo ni provizore ne renovigos la stokon de F. E. I. kaj reaĉetos nur laŭproportcie de la ricevitaj mendoj.

La varoj de kiuj restas provizo, estas vendataj je la originala prezo, ĝis elĉerpiĝo.

La novaj prezoj estos kalkulataj kiel eble plej favore; sekve ni estas devigataj provizore ne plu konsenti rabaton al la grupoj, sed anstataŭe la sendkostoj ne devas esti pagataj, escepte por mendoj de malpli ol 10 frankoj.

EL LA PREZARO:

Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	Fr.	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor		10,— »
La Du Amatinoj — de Musset		7,50 »
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf		12,— »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf		12,— »
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf		5,— »
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl		3,75 »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto		4,— »
La Stranga Butiko — R. Schwartz		17,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz		17,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)		12,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck		5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)		2,— »
Schidlof Zakwoordenboek		22,50 »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)		15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)		10,— »
Flageto por biciklo		6,— »
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto		2,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Vedra stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.


Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj **kovertoj** por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Redakcia-
adreso:
Houwerstraat, 22
Antwerpen.
Tel. : 277.51.



Administranto :
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belga
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝteko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.

Ĉe la lasta numero de la 6a jarkolekto

Tiu-ĉi numero estas la lasta de la nuna jarkolekto. Ses jarojn pene laboregis kaj luktis diversaj redaktoroj kaj kunlaborantoj malegoisme al la eduko de la oficiala organo de nia Ligo. Vere ĝi estas la cemento kiu interligas la grupojn unu al la alia kaj al la Ligestraro. Se Flandra Esperantisto falus, tiam la Ligo disfalus! Sed, ni estas konvinkitaj ke la Flandraj Esperantistoj tion ne volas; kontraŭe vi volas plifortigi nian organon kaj per tio nian F. L. E.! Tial, karaj gelegantoj, *senprokraste, renovigu vian abonon!* Kaj, krom tio, *varbu novajn abonantojn!* Laŭ la kasisto, la deficito estos 400 frankoj; ĉiuj gelegantoj kune do varbu almenaŭ 20 novajn abonantojn kaj nia organo povas pagi sin mem! Kaj ankaŭ : *Varbu anoncantojn!*

Ni, kiel « tempe funkcia » redaktoro kun la helpo de niaj kunlaborantoj, la redakci-sekretario, kaj la maŝinskribistinoj daŭrigas nian laboron, same kiel nia ekspedisto.

Al ĉiuj, kiuj kunlaboris al la 6a jarkolekto, ĉu literature, ĉu teknike, (skribante tiujn-ĉi vortojn, ni pensas al nia formortinta Redaktoro Juul Karnas) ni elkore dankas.

Kaj nun ni komencos kun nova kuraĝo al la 7a jarkolekto !

A. LODEMA.

Lasta Alvoko !

Komunikoj de la Brusela Kongreskomitato

Nur kelkaj tagoj nin disigas de Pentekosto kaj sekve de nia 6-a Kongreso. Jen denove grava epoko en nia movado.

Malgraŭ la ĝisnuna nombro de partoprenantoj, kiu superas niajn plej aŭdacajn antaŭvidojn, ni denove insistas ĉe la samideanoj kiuj ne ankoraŭ findecidis al partopreno, ke neĉeesto estus neriparebla neglekto. Por ili la aliĝebleco ankoraŭ ekzistas, sed tio memkompreneble devas okazi senprokraste. Loĝadon ni ankoraŭ certigas, sed ne plu en hoteloj troviĝantaj en la mezo de la urbo; ankaŭ unupersonaj ĉambroj ne plu estas haveblaj.

Pasintan jaron ni havis la plezuron saluti belan nombron de eksterlandanoj, inter kiu nur unu samideanino el Nederlando. Ĉi-jare niaj nordaj najbaroj venos kelkdekoje ! Sekve ĉi-tiun jaron nia kongreso havos internacian karakteron — sep naciecoj estos reprezentataj! — kaj por ni, flandraj Esperantistoj, tio estas unika okazo por montri ke la Esperanto-movado en Flandrujo ne estas neglektinda. Ni veku favoran impreson al ni sur internacia kampo!

Ankaŭ la propagandan efikon en la ĉefurbo ni ne malamentu. Ĉiu grupo nepre kunportu sian flagon, ĉar la sekvantara iro al la urbodomo devas favore impresi. Tial ni insistas por ke la kongresanoj senescepte portu la kongresinsignon, marŝu bonorde kaj ne malhelpu la trafikon. Per nia sintenado ni montru nin celkonsciaj homoj.

Kongresfotoj estos haveblaj dum la dimanĉa festo kaj ankaŭ kovertoj de la granda kongrestombolo. Belaj, havindaj objektoj kaj valoraj libroj estos la premioj; partoprenu multnombrel!

Notu bone ke la prezoj de la aranĝoj estas fiksitaj antaŭ la malpliigo de la monvaluto kaj ke la K. K. klopodis senŝanĝe konservi ilin, sen domaĝi al la kvalito de la aranĝoj. Ĉiu senescepte montru sian fidon per nepra partopreno.

Ni petas la personojn kiuj, pro profesiaj aŭ aliaj kialoj, ne povas ĉeesti nian 6-an, tamen pagi la kotizon kaj tiamaniere kunhelpi al sukceso. Ĉiujn kongresdokumentojn kaj ankaŭ ekzempleron de la oficiala kongresfoto ili ricevos.

**KAJ NUN ĈIU PRETIGU SIAN VALIZON !
GIS EN BRUSELO !**

Por siaj buŝaj rilatoj, kun la loka loĝantaro, la flandraj kaj nederlandaj kongresanoj nur uzu la nederlandan lingvon !

LA KONGRESKOMITATO.

6-a Flandra Kongreso de Esperanto. Brussel, Pentekosto 1935

PROGRAMO

Sabato 8 junio.

- 16 -a La akceptejo « Breughel » malfermiĝas; ĝi funkcios ĝis la 21-a;
18 -a Kunveno de la akciuloj de Flandra Esperanto Instituto;
19 1/2-a Komuna foriro el la akceptejo al « Hof van Tilmont »;
20 -a Malfermo de la Kongreso;
20 1/2-a Montrado de la filmoj de la antaŭaj Flandraj Kongresoj;
En aparta salono kunveno de la estraro de Flandra Ligo;
21 -a Amuza Ĉe-kurso de Ĉe-instruisto De Kegel;
22 -a Balo kun fama dancorkestro (la dancado daŭros ĝis la 1-a; dum paŭzo: deklamoj kaj kantoj).

Dimanĉo 9 junio.

- 8 -a La akceptejo malfermiĝas; ĝi funkcias ĝis la 10-a;
9 1/2-a Vizito al « Broodhuis », urba muzeo de flokloro (Granda Placo);
En la kapelo de Pletinckxstraat : katolika Diservo (E. prediko);
10 1/2-a Sekvantara iro al la urbodomo (la kongresanoj kunvenas en Pletinckxstraat);
Fotografado sur la ŝtuparo de la Borso;
11 -a Oficiala akcepto en la urbodomo (gotika salonego);
11 1/2-a Jarkunsido de Flandra Ligo Esperantista en la teretaĝa salono de la urbodomo;
13 -a Sekvantara iro al « Brasserie Flamande »;
13 1/2-a Komuna festeno;
17 -a Promenadeto en la botanika ĝardeno.
19 1/2-a Esperantista festo en la granda salono de « Brasserie Flamande » (speciala programo).
22 -a Granda balo (la dancado daŭros ĝis la 2-a).

Lundo 10 junio.

- 9 -a La kongresanoj kunvenas en la akceptejo « Breughel »;
9 1/2-a Vizito al la urbaj vidindaĵoj sub kompetenta gvido;
Fakkunsido de F. U. K. E. (Pletinckxstraat);
11 -a Komuna tagmanĝo en la akceptejo;
12 1/2-a Komuna forveturo, per specialaj tramoj, al la Brusela Mondekspozicio (la envagoniĝo okazas antaŭ la akceptejo);
aŭ : Vizito al la muzeo kaj belega parko de Tervuren;
19 -a Adiaŭa vespero en la akceptejo.

TAGORDO DE LA JARKUNSIDO
DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

1. — Malferma parolado de la Prezidanto.
2. — Raporto de la Sekretario.
3. — Raporto de la Kasisto.
4. — Raporto de la Propagandestro.
5. — Salutparoladetoj de eksterlandaj samideanoj kaj reprezentantoj de grupoj.
6. — Difino de la loko de « NIA 7a ».
7. — Fermo.

LA SEKRETARIO.

La Brusela Dimanĉmatena Foiro

Se vi ja ne ŝatas nomiĝi « dormanto »,
Dimanĉon matenon vin vokas Bruselo
Al sia foir'; ĉar pentrinda juvelo
Folkloro montriĝos al la vizitanto.

Citronoj, oranĝoj, juglandoj kaj pomoj !
Fromaĝo, kukeg', glaciaĵo, viando !
Instigas vin krioj a!... tuja marĉando :
Bonveno komerca de aro da homoj.

Sur strat' de kantisto aŭdiĝas romanco
Pri amo rompita de fraŭloj parizaj;
Bruselaj virinoj ĉu blondaj, ĉu grizaj
Kantetas murmure laŭ ritmo de danco.

Plenigas je libroj la budojn vendistoj,
Laŭdante kvaliton de l'malnova varo :
De l'flandra kaj franca romanverkistaro,
De anglaj, germanaj eĉ rusaj artistoj.

Se eble bezonas vi novan kalsonon,
Kostumon, ĉemizojn, aŭ ŝuojn, aŭ ĉapojn,
Volonte vendisto mezuras la kapojn,
Alia la korpon kaj... laŭdas ĉifonon !

Jen interpremiĝas amaso ĉe tendo,
Plenpena de la plej diversaj vekiloj,
Horloĝoj malnovaj laŭ ĉiuj la stiloj,
Pri kies malsan' tuj finiĝos la plendo.

La junaj geedzoj singarde kontrolas;
Ĉi tie troviĝas por hejmaj bezonoj
La aĵoj malkaraj por ĉiuj sezonoj :
Teleroj kaj tasoj ja kiom vi volas !

Jen bela arego da mebloj : ĉu seĝo,
Ĉu tablo, ĉu benko, ĉu lito, ĉu ŝranko,
Kaj fornoj, eĉ kofro el ŝtalo por banko,
Pentraĵoj, tapiŝ'el palaco de reĝo !

Elektu ĉi tie laŭ milda tarifo :
Fiakrojn, kaleŝojn aŭ aŭtomobilojn,
Biciklojn, tandemojn kaj glitveturilojn,
Ververe, nur mankas la lokomotivo !

Deziras vi diskojn ja preskaŭ senpage,
Eĉ ĉarmon silentan de la gramofono...
Nur venu ! Kaj ankaŭ la radiofono
Konsolos vin en la mizer' ĉiutage...

Se jam pro trouzo la mebloj pereas,
Se forno bezonas la fer-medicinon...
Jen ! Jen ! Carpentisto ektrivos kombinon !
Forĝist', kies famon neniu ja neas !

Sed ĉio ĉi estas nur flank' de l'juvelo
Folkloro, ĉar certe mi multe forgesas.
Mi tial senhonte kaj laŭte konfesas :
Nur venu ! Nur venu ! Vin vokas Bruselo !

POL VARENS.

Pardonu min, ho Bruselanoj...

Pardonu min, ho Bruselanoj
Se en la aro da ĉapitroj
Pri Mannekepis kaj ĉarlatano
Mi vidis tra la okulvitroj
De pura, nura Mehlenano.

Pardonu min se per satiro
Mi mokis pri parizaj moroj
Pri miksajaĉ' de la foiro...
Pri kokinmanĝegada gloro
Silentis Vi, ho, stulta liro !

Pardonu min, ĉar kun fervoro
Laboros mi por granda celo
Vivanta en la flandra koro
De l'vera Bruselan': Juvelo
De l'propra lingvo, amtrezoro !

Pardonu min, ĉar en la lando
La flandroj kun Vi batalados
Por propra bel', por Esperanto.
Malamikajn fortojn ni kunbatos
Tuj iĝos Vi la triumfantoj !

POL VARENS.

Leteroj el Esperantujo

VIII.

Amiko la Koko,

Kiom da Esperantistoj nun estas en la mondo? Ci-tiun demandon mi enpense faris, kiam mi pripensis ke preskaŭ dum duona jarcento ekzistas nia mondhelplingvo Esperanto. Kvindek jaroj! La senpacienuloj kaj nespertuloj kaj pesimistoj inter ni, eble ĝemas kaj konkludas: Se post 50 jaroj tia genia elpensajo ankoraŭ ne venkis la mondon, tiam ĝi neniam realiĝos! Tiuj-uloj kaj-istoj forgesas, ke Esperanto estas (provizore) neprofitdona idealo! Gazo, elektriĝo, akvokondukilo, aŭtomobilo, aviado, vaporo kaj motoro estas profitdonaj kaj bezonis malpli ol 50 jarojn por venki la mondon! Sed ekzemple la religioj? Ĉu vi aŭdis iam pri iu ajn religio, kiu venkis la mondon? Kaj ni rajtas supozi ke ĉiu religio tre volonte volus ke ĝi estu la ununura en la mondo kaj ke la tuta homaro obeu al ĝia eklezio. Kaj kiel longe batalas la diversaj religioj (kiuj fakte ankaŭ volas realigi idealon) por atingi rezultaton? Tiel longe, kiel ekzistas la mondo, aŭ ili mem! Kaj plejparte ili povas batali per rimedoj, pri kiuj Esperanto ne disponas, nome: mono kaj pagataj propagandistoj.

Esperanto estas ankaŭ kredo: Ĉiu konvinkita Esperantisto kredas al la fina venko, ĝi daŭru ĉu duonan jarcenton, ĉu pli longe! Kaj nun ni revenu al la demando: « Kiom da Esperantistoj estas en la mondo? »

Antaŭ proksimume 10 jaroj la germana profesoro Diterlé entreprenis grandampleksan laboron. Tra la tuta mondo li sendis al ĉiaj grupoj, kluboj, asocioj, federacioj, kaj eĉ al izolaj Esperantistoj demandaron. Tiel li klopodis formi al ŝi bildon pri la Esp.-movado en la mondo kaj taksu la nombron de Esperantistoj. Bedaŭrinde mi neniam legis la rezulton de tiu giganta laboro. Mi aŭdis ke la rezulto ne estis publikigita ĉu pro manko de kunlaboro, ĉu pro la fakto, ke la rezulto restis treege sub la antaŭtaksita nombro.

Do, ni ne plu demandu, kiom da Esperantistoj ekzistas, sed ĉu la ĝenerala movado progresadas? Kaj senhezite ni povas respondi: Jes! Depost kiam Andreo Cseh enkondukis sian mirindan instrumentodon, ni kalkulas niajn adeptojn je miloj. Dum la lastaj 5 jaroj 40 Csehmetodaj instruistoj vojaĝas de lando al lando, *kaj instruis pli ol 40.000 homojn!* Klasoj konsistantaj el 200 ĝis 300 lernantoj ne estas maloftajoj!

En Nederlando fraŭlino Margareta Saxl instruis dum la lastaj sep monatoj pli ol 600 gelernantojn, inter kiuj grandan kvanton da infanoj. Jen la materialo kion ni bezonas!

En Sud-Francujo Fino Lidja Zamenhof instruas 361 gelernantojn! Kaj la tuta Cseh-metoda movado estas gvidata de Andreo Cseh kaj la nelacigebla Sino Julia Isbrücker! La rezultatoj estas rimarkeblaj el la agoj de la aŭtoritatoj: En Nederlando pendas en la stacidomoj en videbla loko, ŝildo kun la nomo kaj la adreso de la U. E. A. delegito. Oficiale la nederlanda P. T. T. aprobis ke ĉe la poŝtĝicetoj pendas afiŝo: « Oni parolas Esperanton », dum la deĵortempo de la oficisto, kiu parolas nian lingvon. Samspecaj komunikoj nin atingas ankaŭ el aliaj landoj.

En Lyon iu feliĉulo gajnis duonan milionon da frankoj je ĉevalkurado. Konato de tiu feliĉulo rekomendis al lia afableco la Lyon'an Universitatan Esperantistan Rondon. Kaj nia duonmiliono donacis bileton de 1.000 Frankoj ! Kio pensus amiko Bassleer, nia kasisto, pri tio ? Image mi vidas lin liplekanta !

Ĝis Pentekosto en Brussel !

R. LA VULPO.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajna ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

E. DRESEN. — PRI PROBLEMO DE INTERNACIIGO DE SCIENCE TEKNIKA TERMINARO, Eldono Ekrelo — 1935 — trad. el la rusa : Samojlenko. — Raporto akceptita de la sovetunia akademio kaj de Intern. As. de Normig-asocioj (ISA) 1934.

Problemo, kiu ne rapide trovos solvon pro ĝia komplikeco ! Se oni komence nur liberigis de la malnovigantaj aŭ sinonimaj terminoj, paŝo estus jam farita... Sed en la naciaj lingvoj mem, la malfacilaĵoj estas jam tre grandaj, kaj S. ano Dresen, montrante kio ĝis nun estas farita, atentigas pri malakordiĝoj eĉ en samlingvaj landoj. Oni komprenas la gravecon de la problemo precipe por Sovetunio, kie la nomoj tamen de tutlanda signifo estas jam leĝe devigaj.

La funde ellaborita raporto, kiu ankaŭ skizas la historian evoluon de sciencteknikaj konceptoj, terminoj, simboloj, klasifikaj sistemoj, pazigrafioj, k. t. p., havas konkludon pri kiu ne ĉiuj esperantistoj kontentigos.

La verkinto vidas nur savon en aŭtoritata internacia normig-asocio, limigante la rolon de Esp. al regulado de interdependo kaj interkompreno de terminoj en naciaj lingvoj. La Esp. fakuloj havas la nepran devon kompletigi kaj perfektigi la jam ampleksan materialon senripoze. Esperanto estu preta !

T.

HEREZULO. — Ni ricevis N° 1 de « Herezulo », sendependa revuo por batalado kontraŭ ĉiajn dogmojn. Ĝi aperas ĉiu-trimonate. Redaktas kaj administras : ESPERANTO, 14, avenue de Corbéra, Paris 12°.

Jara abonprezo : 4 respond-kuponoj aŭ 6 fr. frankoj. Poŝta ĉek-konto : E. ADAM, Paris, 1350.62.

GVIDFOLIO TRA DIKSMUIDE. — Bele ilustritatan gvidfolion tra Diksmuide sendis al ni la Turisma Oficejo de tiu urbeto. Informoj al turistoj donas buŝe aŭ skribe : Turisma Oficejo, Urbdomo. Tel. 7.

Ni ricevis : HISTORIO PRI LA SKISMO EN LA LABORISTA ESPERANTO-MOVADO. — Dokumentaro kiu montras la kaŭzojn kaj respondecojn kaj preparas la bazon por unueca agado. Eldonejo : SAT., 67, avenue Gambetta, Paris 20°. Prezo : 2 fr. fr .

Printempo en Svislando

DE JUUL KARNAS †

(*Letero, skribita al lia grupo, printempo 1933*).

Printempo ekkomencas kaj neĝis dum la nokto, kiel cetere ankaŭ dum la du antaŭaj. La neĝotapiŝo jam atingis dikecon de proksimume unu metro kaj oni malfacile kapablas imagi al si, kian belecon la naturo tie-ĉi senkoste elviĝigas. Sur la tero kuŝas kvazaŭ blanka felo, kiu preskaŭ ne plu estas trafenetrebla; la tegmentoj de la karakterizaj svisaj montodomoj ŝajnas pezaj sub siaj delikataj ŝarĝoj kaj la abiobranĉoj kurbigās sub la premo de fortaj neĝamasoj. Glacikegloj, inter kiuj estas longaj je pli ol 1,50 m., elpendas de la tegmenta defluilo antaŭ la fenestro de mia najbaro. Ili tie estas kvazaŭ travidebla kurteno el milionoj da kristaloj, kiuj amasiĝis peceton post peceto en unu nura nokto. Estas magie kaj fabele samtempe kaj montriĝas antaŭ la okulo de malfeliĉulo kiel mi, abundo, beleco, riĉeco, kompare al kiuj oraj moneretoj ŝajnas senvaloraj!

Super ĉiuj mirindaĵoj nun la suno ardas kaj ĝi naskas rebrilon kaj helecon, kiuj doloras al la okuloj. Oni ŝirmige deturnas la rigardon, sed vole nevole revenas ĉar estas multe, tro multe por vidi kaj la bildoj tiel rapide interŝanĝas ke ili eĉ ne ĉiuj sukcesas atingi la cerbon por tie fiksi detalan impreson.

Kaj jen, malproksime en la montaro ekleviĝas vaporoj, kiuj iĝas des pli densaj, ju pli la suno hejtigos, kaj baldaŭ ĉio tie similas al senfina maro de fumo kaj nebulo, malantaŭ kiu la « Weisshorn » kaj ĝiaj satelitoj iom post iom malaperas kaj poste ree videbliĝas.

La ĉielo elmontras jam grandegajn blujn makulojn kaj tamen ankoraŭ neĝas; sed la ludetantaj neĝeretoj nek havas tempon, nek okazon eksidi sur tero, tegmento aŭ branĉo, ĉar la radiantanta suno samrapide ilin vaporigas, kiel la griza neĝonubo ĉi-supre ilin terenŝutis.

La abioj rigardadas tion ridegante, malgraŭ ke ili sub peza ŝarĝo kurbigās. De temp' al tempo, kvazaŭ en plej intensa fortoelprovo, branĉo sin malligas el la jugo, kiu ĝisrompe ĝin premas kaj skuante ĝi forjetas sian blankan pelton, kiu polve dis- kaj ĉirkaŭflugetas sur pli aĝaj branĉoj aŭ fine sur la ebena tapiŝo de l' tero. De la tegmentoj la dika neĝoamaso malrapide, preskaŭ nevideble malrapide malsuprenĝitas kaj kiam la pezo iĝas tro granda, ĝi rompiĝas kun mallonga glacikrako kaj pli malpli impona tavolo kun seka bruo terenfalas, iom poste polverigante.

Sed jen mia « Weisshorn--knabino » traboras la nebulvualon. Si estas kvazaŭ dua, pli bona Brunehilde el la Sepmontaro. He, kiom ŝi trezore bele aspektas, neĝokrovrita en la arda sunradiado! Si pro beleco brilas kaj ŝajnas feliĉe kaj kontente alrigardadi la Itale blujn aermakulojn.

Kaj mi, nur duonvestite mi kuŝas en mia balkono kaj mi ĝuas. Mi ĝuas kiel sendube iam Guido Gezelle estis ĝuinta, kiam li verkis « La Silvinesteto'n ». Intertempe Johanet-la-Suno sendas ankaŭ tien

ĉi siajn bruligajn radiojn kaj envolvas eĉ min, nekonatan Siegfried kun ĉifitaj bloviloj, en subtala vaporvualo. Post kvaronhoro mia balkono estos seka kaj la lasta nebulo forfluginta.

Kia belega lando de arda sunbrilo kaj neĝo eterna!

Montana 21/3/33.

Juul KARNAS.

Jacob van Maerlant

Antaŭ sep jarcentoj naskiĝis en Flandrujo poeto, kiu alte superas siajn samlandanojn kaj okupas honorlokon inter siaj eksterlandaj kolegoj. Estas Jacob Van Maerlant, pri kiu lia skolano Boendale certigas, ke li estis « la patro de ĉiuj » dietsaj « (popollingvaj) poetoj ». En lia ampleksa verkaro (1) unuafoje estas perceptebla la nacieca sento (2) kaj la artisma verso, la pli pura liriko, kiel atestas la « *Strofaj Poemoj* » el lia lasta periodo.

En la *Strofaj Poemoj* nin ja trafas jam belsona lingvomuziko en tempo, kiam la skriba lingvo ankoraŭ estas naskiĝanta. Ni citas du strofojn el « *Pri la Lando trans la Mar'* » en kiu Maerlant, kun juna fajro kaj nobla indigno instigas la okcidentajn kavalirojn protekti al minacatan kristanaron, per versoj artformaj, trilantaj pro emocio:

Kristano, kie via fid'
Kie estas la decid'
Servi Kriston tre sincere?
Pripensu, ĉu li en ama avid'
Sin krucumigis pro via perfid'
Kaj korvundigis sin sufere?
Subpremata la kristanid'
De l' Sarazanoj, nun sen brid'
Ve, la land' pereas mizere!
Kie Krist' en plenkonfid'
Verŝis sangon, mankas gvid',
Kontraŭstaro, kaj mi malespere
Vidas senatenton netolere!

De l'Eklezio la bieno,
Hered' perdiĝis, ho malbeno!
Ne restu do senemocia!
Ŝi, la patrino, en soleno,
Vin liberigas de l' pekoĉeno
Per sankta bapt' evangelia.
La satanido, la veneno,
Superregas, ho abomeno,
Nun sole en la lando via!
Plorante krias en ĉagreno
l'Eklezi': Ho Krist' sen peno
Oni vin forrabis ja,
Pugna pro patria (3)

Tamen dum lia juneco allogis lin la kavalira literaturo kaj li verkis kelkajn romanojn laŭ franca modelo, « *neniaĵoj* » pri kiuj li poste profunde hontis. Maerlant tiam transiris en alian eksceson, nome la didaktikan, kiel serĉanto de pli reala vero.

En « *La Floro de l'Natio* », « *La Rimbiblio* », « *La Historia Spiegulo* », « *La Vivo de Sankta Francisko* » k. a. li instruas al la burĝaro la naturan, historian kaj politikan sciencan, la etikon kaj la sanktan kaj mondan historion.

Maerlant havas sian monumenton en Damme, sed pli ol tio lia arto mem, kreskis je nacia monumento, atestante pri pasinttempa flandra gloro.

TYNEVERUM.

(1) Konservigas de li pli ol 228.000 versoj.

(2) «...Kaj ĉar mi estas Flandro », li diras en iu verso.

(3) Batalu por via patrujo.

Okazis iam dum vagado
 De la Sanktul'kun iu frato,
 En la proksim'de Venecio...
 Ĉe marĉobord'la melodio
 De birdoj ege lin altiris,
 Kaj al la frat', Francisko diris:
 « Ĉu vi la birdokanton aŭdas?
 » Fervore ili Dion laŭdas.
 » Kun la fratinaĵ birdoj, ni
 » Ja ankaŭ preĝu nun al Di'. »
 La birdoj ne ektimis pro l'
 Alveno de la apostol'
 Kaj restis en la sama loko.
 Sed sekve de la brua voko
 La sanktaj viroj ne sukcesis
 Laŭvice preĝi, kaj konfesis
 Ne aŭdi unu la alian.

Francisko sin turnante tiam
 Al birdoj, alparolis: « Miaj
 » Fratinoj, ĉesu nun ĝis niaj
 » Laŭdpreĝoĝj je l'honor'de Dio
 » Ekfinis. » Kaj neniu krio
 Aŭdiĝis tuj post la ordon',
 Eĉ ne la plej malgranda son'.
 Kaj dolĉe la du beatuloj
 Nun preĝis laŭ la psalmformuloj
 Sed tuj post la preĝada fin'
 Francisko petis kun estim':
 « Ek! Birdoj karaj, nun sentimè
 » Kunkantu laŭdon laŭkutime...
 Kaj jen, post tiu ĉi permeso,
 Rekantis ili kun sukceso.

Trad. POL VARENS.

La Nederlanda Literaturo en la Rusa Literatura Enciklopedio

En Moskvo estas aperanta granda enciklopedio en dek volumoj pri la literaturo de la rusa sed ankaŭ de la aliaj mondcivilizoj.

En la oka volumo, la nederlanda literaturo estas pritraktita en ne malpli ol dek ses kolonoj, fare de Jef Last.

La artikolo estas ornamita per kolorita bildo de miniaturo (J. Van Maerlant, la falo de Jerusalemo) ilustraĵo el Renĉjo la Vulpo, la titolpaĝoj de « Nova *Geuzen*-kantlibreto » kaj de Palamedes de J. v. d. Vondel, ilustraĵo el « Max Havelaar » de Multatuli kaj el « Majo » de Gorter.

Estis la tasko de la verkinto prilabori la materialon el la vidpunkto-kompreneble-klasbatala, sed laŭ recenzo de nederlanda ĵurnalo, precipe la pli kaj, plej juna literaturo estas pritraktita tro supraĵe. Tamen la verkinto, al tiu kritiko respondis, ke li nur vidis per la presprovaĵoj ke oni — sen lia antaŭa scio — kvaronigis lian artikolon neĵugkapable, fortstrekante multajn nomojn. Plie li asertas ke la tradukto de Zaimofsky estas farita pli divenprove ol litere, kaj ke ĝenaj preseraroj abundas.

Sekve al lia protesto oni sciigis al li « ke oni nur povus diŝsiri presprovaĵojn, ĉar la tuta numero estas jam aranĝita » Post tio la verkinto skribis detale al la redakcio, pri la enestantaj eraroj, sendante kopion al diversaj personoj en Moskvo, kaj anoncis ke li nepre malakceptas la respondecon pri la artikolo.

T.

Donu al Cezaro.....

La flandroj sentas sian kulturan unuecon kun Nederlando kaj kiam ekz. la flandraj Esperantistoj sekvigas siajn tradukojn de la vortoj « *el la flandra* », tio nur signifas, ke ili volas atentigi la eksterlandanojn pri la teritoria deveno de la tradukita verko kaj ties aŭtoro. Cetere ili emas doni al Cezaro — ni diru al Nederlando — tion, kio al Nederlando apartenas. Sed montriĝas en Nederlando kontraŭa tendenco aŭ eble neatento.

En kelkaj pasintjaraj numeroj de LITERATURA MONDO troviĝas du artikoloj, kiuj ŝajnas pravigi ĉi tiun opinionon.

S-ro *Joh. Hartog* aperigis resumon pri « *La Nederlanda Literatura* ». Ĉu nederlanda en ĝenerala senco? Oni dirus ke jes, ĉar li citas la flandrajn mezepokajn verkojn ĝis la 16a jc. i. a. « *Vulpo Renardo* » (troviĝas erare *Lupo Renardo*) Van Maerlant, Hadewych k. t. p.

Sed poste S-ro Hartog nur mencias ekskluzive aŭtorojn el la nuna nederlanda regno kaj pruvas do, ke tia estis nur lia intenco. Sed fine li denove certigas, ke la fama nederlandregna poetino H. Roland-Holst kaj la flandra mezepoka aŭtorino Hadewych « estas la solaj vere grandaj poetinoj el *nia* literaturo ».

Nu estas fakto, ke Flandrujo estis la naskejo de la nederlanda literaturo kaj, ke en la 13a kaj 14a jc. la rolo de Holando kaj de la aliaj nordaj regionoj estis relative malgranda. La « diet-a » lingvo estis nur flandra dialekto plialtigita je skriba lingvo.

Kompreneble oni ne povas konigi la nederlandregnan literaturon, neklarigante ĝian devenon, sed tiam estas evitenda la nepreciza, erariga, ambaŭsenca uzado de la vorto « *nederlanda* » Verdire la eksterlando estas tiel malbone informita pri la signifo kaj interrilato de vortoj: nederlanda, holanda, flandra, nord- kaj sudnederlanda, ke ties uzo bezonas ioman klarigon, kiel S-ro Hartog mem faras nekomplete pri la esprimo « *holanda lingvo* » Krome la vorto « *flandra* » ne estas trovebla en la artikolo kaj tio ankaŭ estas tipa por niaj nordaj lingvofratoj, kiuj volonte metas la etiketon « *belga* » sur artajn verkojn, kiuj nur ricevas signifon pro sia flandra esenco.

La sama pli malpli valoras por la dua aludita artikolo, tiu de S-ro *M. J. Wessel* pri la « *Nederlanda Pentrarto* » Nur parolante okaze pri la Holanda skolo kaj ne pri la flandra, li faras la distingon inter Nord- kaj Sudnederlando (Sudnederlando: do la nuna Flandrujo kaj ne la sudaj provincoj de la nederlanda regno).

Estas ja vere, ke pli ol niaj literaturistoj, niaj flandraj pentristoj Van Eyck, Rubens, Van Dyck k. a. estas universale konataj. Sed kial la modernaj flandraj pentristoj ne estas troveblaj en la artikolo, kvankam tio ankaŭ estus necesa por pravigi la titolon? Aŭ ĉu la ĝenerale nederlanda pentrarto ĉesas esti tia, post la malapero de la historiaj Nederlandoj por esti daŭrigata nur en la nuna nederlanda regno?

Ŝajnas al ni, ke niaj nederlandaj samideanoj estas viktimoj de la malbona kutimo intermiksi sur arta kampo la konceptojn « *popolon kaj ŝtaton* ».

TYNEVERUM.

Ŝipekskurso Antwerpen-Vlissingen-Antwerpen

Ĝi okazos dimanĉon, la 7an de julio venontan, per la vaporŝipo « ZEELAND ».

La ŝipo foriros je la 8a precize, de la flosponto apud la Suiker-rui kaj kastelo « HET STEEN ». La alboardigejo estas atingebla de la centra stacidomo per tramlinio 2 (direkto Keiserlei) kaj de la suda stacidomo per tramlinio 6.

Surŝipe troviĝas malvarma bufedo kaj trinkaĵoj.

Ni atingos Vlissingen ± je la 12a kaj foriros de tie ± je la 17a. Je la 21a. ni jam staros sur la Antverpenaj pavimoj. En Vlissingen oni povas bani en la maro.

La prezo de la tikedoj estas po Fr. 17,50 kaj haveblaj ĉe subskribinto.

Al grupestroj mi sendos post demando sen antaŭpago la necesan kvanton da tikedoj. Al unuopuloj mi sendos nur post antaŭpago, ĉu per poŝtmandato, ĉu per registrita letero. Ankaŭ dum la du kongres-tagoj en Brussel tikedoj estas haveblaj.

Ĉiu, kiu povas, do liberigu la 7an de julio kaj ĝuu ĝojplenan kaj sanigan tagon sur la Schelde inter gesamideanoj. La verda flago flirtos al la mastpinto !

Ne forgesu viajn pasportojn !

A. LODEMA,

Houwerstraat, 22, Antwerpen.

La Ansero

Paŭlo bonhumore venis matenmanĝi kaj lia edzino tre serveme plenigis lian tason je teo. Antaŭ lia telero troviĝis diversaj leteroj, kiujn li preterfluge envidis. Li donis al sia edzino leteron, kiu estis adresita al ŝi. Kun demandanta rigardo al sia edzo ŝi malfermis la leteron. « Oh ! ĉu vi scias kiu ĝin skribis ? »

« Ne », respondis la viro.

« Estas la familio Jansens, vi certe memoros, kun kiu ni konatiĝis ĉe la maro, pasintan jaron. »

« Oh ! tiuj, ĉu ili do vivas ankoraŭ ? Kion ili skribas », demandis la edzo iomete pikite.

« Ili venos vespermanĝi morgaŭ », diris la edzino.

« Ho ! Ho ! Ĉu viaj amikoj do invitas sin mem ? ! Tio estas tre facila ! Tiu vespero kostos nenion al ili ! Bela paro, viaj amikoj, tion mi devas diri ! »

« Kial ili estas nur miaj amikoj ? Vi ja ilin konas tiel bone kiel mi ! Kiu unue alparolis ilin tiam ? »

« Mi », diris Paŭlo, « sed mi nur konas la viron kaj ne lian edzinon. Oni ja ne devas subite konatiĝi kun la tuta familio, ĉu ne ? Sed tion mi volas diri, vi sole pagos ĉion el via poŝo ! Mi nenion aldonos ! Vidu nur kiel vi aranĝos ĉion », kaj kolere li foriris.

Jano ploregis, ŝi ne sciis kion fari, por, kun iomete da mono, pretigi agrablan vespermanĝon. Si vokis la servistinon.

« Ĉu restas al vi ankoraŭ iomete de la mono, kion mi donis al vi pasintan mardon ? »

« Ne sinjorino ! » respondis la knabino.

« Tion mi pensis », balbutis Jano, duonvoĉe.

Post kelkaj momentoj de profunda pripensado, ŝi denove alvokis la servistinon kaj diris : « Aŭskultu nun bone ! Morgaŭ vespere amikoj vizitos nin. Estas malnovaj konatuloj de mi. Ili venos vespermanĝi. Bone atentu nun ! Mi diros, kiam ni altabligas, ke mi havas rostitan anseron. Iomete pli frue vi alportu la ok en la ŝranko troviĝantaj malgrandajn kolbasojn, bone varmigitaĵ. Tiam vi rapide reiros al la kuirejo kaj faligu kun multe da bruo teleron precize en la karbuĵon. Poste vi ploreĝos kiel eble plej brue. Mi donos al vi riproĉon, sed tio ne estos serioze infencita. Ĉu vi bone komprenis ĉion ?... »

« Certe », diris la servistino, kiu ekŝatis la historion.

La vizito estis anoncita de la servistino.

La gegastigantoj tre ĝentile akceptis la vizitantojn, kun la necesaj belaj vortoj kaj manpremoj.

Sinjorino Janssens alportis rozbukedeton, kiun ŝi donis al Jano ; « bagatelaĵo » ŝi senkulpigis sin.

« Sed tio ne necesis », diris Jano, metante la florojn en vazeton.

« Ni tuj altabligu », ŝi daŭrigis, ĉar certe vi malsatos, ĉu ne ? »

La duo Janssens ne lasis ripeti tion dufoje, kaj ĉiuj ekŝidis ĉe la intima tablo.

« Mi esperas ke vi ne faris tro da peno por ni », diris sinjorino Janssens.

« Oh ne ! » respondis Jano, « ni nur havas anseron ! »

« Ĉu vi vidas, ĝoje rimarkis la vizitantino al sia edzo, kies tuta vizaĝo jam radiis, « kion mi diris ? ! Certe ni havos iun bonaĵon, eble eĉ anseron. Tiuj momente ne estas ankoraŭ tiel multekostaj. »

« Vi tre kontentigas nin, ke vi ŝatas tion », diris Paŭlo, kiu ankoraŭ ne multe parolis.

Jano iomete timis, ĉar ankaŭ ŝia edzo nenion sciis pri la ansera historio.

Nino staris en la kuirejo. Nek proksime, nek malproksime oni povis vidi anseron. Si tenis en la maldekstra mano ok kuiritajn kolbasetojn sur telero. En la alia mano ŝi havis du telerojn kiujn ŝi devos brue ĵeti en la karbuĵon kiam oni sonorigas.

Intertempe en la manĝocambro oni metis la buŝtukojn kaj Jano sonorigis.

Tiam, subite, aŭdiĝis orelsurdiga bruego kaj virinvoĉa krio.

« La ĉielo min helpu ! » ekstremis Jano, « tio estas sendube la ansero kiu falis », kaj laŭte ŝi alvokis Ninon. Ĉiuj, la okuloj direktitaj al la pordo, atendis malpacience, kaj tie aperis tre malrapide kaj ploregante Nino.

« Nino ! kio okazis tie ? kio falis ? Certe la anseron ĉu ne ? Nino ne respondis sed daŭrigis plorĝemi korŝirige.

« Estas tre malagrabla », senkulpigis Jano sin, al siaj vizitantoj, « nun mi havas nenion plu por manĝi ol kelkaj kolbasetoj kiujn mi hazarde havas en domo. Ke tio ĵus okazas hodiaŭ ! Nino ! respondu nun ! Kio okazis ? »

Nino ĉiam ne respondis, sed daŭrigis plori iomete pli mallaŭte.

« Vi lasis fali ion, mi almenaŭ aŭdis abomenan bruon ! »

« Jes ! » respondis Nino ĉiam plorante.

« Kie ! ? »

« En la karbuĵoj ! »

« Eble la anseron ? » demandis la gastigantino, kiu jam ĝojegis pri la plensukceso de sia ruzajo.

Tiam la servistino ploregis ankoraŭ pli laŭte kaj fine, ne plu sciante kion fari, ŝi balbutis : « Ne ! la kolbasojn ! »

Rerakontis F. VOLDERS.

Gratuloj

Edziniĝis la 16an de majo fraŭlino Simone Lamote, Ruselara samideanino, kun sinjoro Pierre Raes de St-Pieters-Woluwe. (Gratulojn de la Redakcio !)



**Relegu paĝon 158 de
la antaŭa-kaj paĝon 174 de
la nuna numero !**

Grupa Vivo

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La 8an de majo nia amiko C. Schroyers komencis novan kurson. Dank'al persona propagando kaj pere de la Antverpena gazetaro, diversaj lernantoj sin enskribigis. Esperu ni ke ili iĝos bonaj esperantistoj kaj veraj propagandistoj por nia idealo « Esperanto ».

Pasintan monaton nia grupo ekzamenis la eblecon meti esperantan afiŝon en la tunelo por piedirantoj, sed laŭ informoj ni sciiĝis ke la lukostoj estas tro altaj por nia kaso; ni do devos kontentigi nin pere de la gazetoj, kiuj ĉiam estas pretaj por enpresigi niajn artikolojn senpage.

BRUSSEL. — N. E. L. E. — Dimanĉon la 5-an de majo, nia grupo ekskursis al Alsemberg. Nia ano R. Loeckx gvidis nin tra la ĉarma ĉirkaŭaĵo de tiu Brabanta vilaĝo. Bela vetero favoris nian promenadon, kvankam la nombro de partoprenantoj ne estis sufiĉe kontentiga.

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis de la provincestraro komunikon, ke ni rajtas elekti kvanton da libroj por nia biblioteko je valoro de fr. 225. (La redakcio gratulas !)

KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO-VERBOND K. V. E. V.

Samtempe kiel Flandra Ligo Esperantista, la Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj havos sian duan kongreson de la 8a ĝis la 10a de junio 1935. Dimanĉon en la kapelo Pletinckxstraat, Sankta Meso kun Esperanta prediko de la konata Pastro De Coene. Redempt. Je la 5a posttagmeze kunveno en la sama ejo, de la I. K. U. E. — La kongreso kaj speciale la katolika kunsido en Romo estos preparolotaj tie. London ankaŭ St. Meso je la 8a matene kaj Esperanta prediko en la sama kapelo. Poste, Generala kunveno de F. U. K. E., bonven-saluto de la Prezidanto, Jarraportoj de la sekretario kaj de la kasis-tino. Preparolado de la situacio, interŝanĝado de pensoj, proponoj, k. t. pl.

La estraro ege esperas ke la anoj multnombre partoprenos kaj montros al la eksterlandanoj ke la Katolika Esperanta Movado en Flandrujo kreskas kaj estas vivoplena.

Do, ĉiuj al Brussel je Pentekosto.

LEUVEN. NOVA TAGIĜO. La esperanta kurso kun 37 enskribitoj, kiun Sro. Rainson el Mehleno majstre gvidis, en urba lernejo en Loveno, fermiĝis je Pasko.

En la sama lernejo okazis ekzameno la 5an de majo, kiun parto-prenis 12 gesamideanoj el Loveno, Mehleno kaj Aerschot.

Nova Tagiĝo organizis la 16an de aprilo Zamenhofan vesperon. Portreto de Dro. Zamenhof, ĉirkaŭita de verdaj plantoj, staris en honora loko.

S. ino Sindhwad el Bruselo paroladis pri la vivo de nia kara Majstro. Poste ŝi gvidis la gekantantojn, helpate de fortepianistino. Kelkaj afablaj samideanoj el Mehleno ĉeestis.

MECHELEN. — LA ESTONTO.

Unue ni rimarkigu al ĉiuj niaj membroj nepre repagi la mem-brecon kaj abonon al F. E., ĉar ekde julio komenciĝas la sepa jarko-lekto. Nia revuo estas la sango de nia ligo, sen ĝi ankaŭ la ligo ne povas vivi, kaj komparante ĝin kun eksterlandaj naciaj kaj alispecaj esperantaj gazetoj ni vere povas fieri pri ĝi.

Pluraj el niaj membroj partoprenis la ekzamenojn en Leuven, kaj certe ni tuj aŭdos pri ilia triumfo.

Denove la Somero nin regalas aŭ ne regalas. Ĉiuokaze ni kun-venas regule kaj la forrestantoj vere perdas kelkajn interesajn kaj agrablajn kunestojn. Ni ankaŭ lernis novan ĝojan kanton, kaj sin distingas... nia simfonio!

Estas feliĉa fakto ke ni almenaŭ tiom multnombre kiom pasintan jaron ĉeestos la kongreson en Brussel.

La sekretario jam de nun invitas la gemembrojn ĉe li, je la dua vendredo de julio, kaj eĉ tiuj, kiuj... neniam plu venas, devas sin montri je tiu okazo. (Malpermesate renkonti amikojn aŭ forgesi la domŝlosilon tiun ĉi jaron!)

KONKLUDO : Nia malgranda kerno vivas en vera esperanta spirito, ĝi kontaktas koresponde kun ĉiuj mondpartoj, kun ĉiuj rasoj... Sed samtempe ni ne forgesas esti Flandroj, ĉar ja ĉiam nia kara patrujo bezonas nian senlacan kunhelpon, nian daŭran lukta-don.

OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

La 12an de aprilo finiĝis la Esp. kurso donita de amiko Houfe en la urba lernejo. Ĝis la fino ĉeestis 22 gelnantoj, novaj kaj malnovaj. La 15an de aprilo ni kunvenis en nia ejo «Hotel de la Marine». Diversaj punktoj estis sur la tagordo. Unue ni detale priparolis la enhavon de la aprila numero de FL. ESP., okaze de la Brusela kongreso, kaj poste ni kolektis la aliĝmonon de la partoprenantoj. Ĝis nun enskribigis sin 6 personoj. Ankaŭ ni lokigis anoncon en Heroldo, demandante korespondantojn por la novuloj. Ĉar la kurso finiĝis, la novaj membroj aliĝis nun al la grupo. Per tiu enskribo la grupo nun nombras 27 anojn.

La 22an de aprilo ni vizitis 12ope la parkojn de Wynendaele. La bona vetero helpis nin sukcesigi nian unuan veturadeton. Estis tamen ankoraŭ iom frue, ĉar nenia printempa floro estis jam videbla. Ni decidis dum la somero reviziti la parkojn.

La 29an ni refoje kunvenis kaj instruis la Esp. ludaĵojn al la novuloj. Ankaŭ estis disdonitaj la sendaĵojn, kiujn ni ricevis sekve de nia anonco. Bildkartojn ni precipe ricevis el Germanujo, Polujo, Britujo, Svedujo, Svisujo kaj Nederlando.

La 12an de majo ni biciklos al Lophem apud Bruĝo. Vizito al la labirinto kaj migrado en la arbaroj.

Ĉar nuntempe, ĝis fino de majo, la soldatoj faras ilian tendaran servon en Beverloo, ni devis adiaŭi kamaradon Braekevelt el Roeselare, kiu dum sia militservo tie-ĉi aliĝis al nia grupo.

RONSE. — « LA PACA STELO ».

Dum la monato junio ni havos interesan kaj plenpenan laboran monaton. Sur la programo sendota al ĉiu membro troviĝos inter alie kantvesperon, tradukon de la libro kaj raporton pri la 6a Flandra kongreso. Ankaŭ ni sciigos, je konvena tempo la daton kaj lokon de nia ekskurso monata. En julio nia ekskurso estos al Belœil.

La grupa vivo denove multe pliviviĝis kaj formas ĉiusemajne belan rondon. Rilate la kongreson, niaj « Pacaj Stelanoj » liveros interesan kontingenton da partoprenantoj inter kiuj flandroj, valonoj, svisoj kaj germanoj, entute 24 personojn, kiuj certe venos kaj kompreneble jam pagis!

Jam de nun, ni petas la gesamideanojn varbi novajn elementojn por la estontaj kursoj.

RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO. — London la 6an de majo vizitis nian grupon Sro M. Devoldere, samideano el la Kortrijka grupo, kiu nun loĝas en Geluwe. Kelkaj gemembroj aŭdigis kantojn kaj ankaŭ sinjoro Devoldere pligajigis la kunvenon per kelkaj kantoj, de li mem esperantigitaj. Sekvis esperantaj konversaciaj ludoj.

Tiu vizito — agrabla surprizo.

Jen preskaŭ ok monatojn ke nia Prezidanto Hon. Braekevelt nin forlasis pro militservo. Ni atendas lian revenon je la fino de la monato. Li retrovos la grupon ne malpli aktiva ol antaŭ la foriro.

Daŭran propagandon faris la estraro por partopreno al la Brusela kongreso; sekve de tiu propagando 15 gemembroj jam aliĝis (komence de majo). Partoprenante preskaŭ dudekope ni pravas ke la Ruselara Grupo ankoraŭ vivas.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussei: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Hovestraat, 130.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wollemarkt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.
Nieuwpoort: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Maria-Hoorebeke: Gerard Broodcoorens, Dorp.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,
estas 112 paĝa,
enhavas ion por ĉies gusto,
enhavas la plej belajn perlojn el la
popolkantoj de ĉiuj nacioj,
estas bele eldonita,
kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe

H. v. d. Mast. poŝtkonto : 209.852.

Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj

malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Kien iri je Pentekosto 1935? (8 - 10 Junio Al la **6^A Flandra Kongreso de Esperanto en Brussel**

Abonu tuj la monatan gazeton

“ LA JUNA VIVO ”

Jen vi havas la plej malkaran gazeton por gejunuloj kaj komencantoj. Interesa enhavo, facile komprenebla lingvo; tre taŭga legaĵo por kursoj.

Jarabono : 15 fr.

Petu senpagan specimenon de :

Redakcio de « LA JUNA VIVO »

West-Graafdyk N. H.

Nederland.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.